



Alparolo de la reprezentanto de Universala Esperanto-Asocio (UEA),
okaze de la 10-a sesio de la Homrajta Konsilio,
Palaco de Nacioj, Ĝenevo, 23a de marto 2009

Sinjoro Prezidanto, Gesinjoroj,

La tutmonda asocio de la parolantoj de la internacia lingvo Esperanto, Universala Esperanto-Asocio, laboras por la respekto de la lingvaj rajtoj, samspirite kiel la programo de la Unuiĝintaj Nacioj por la evoluo.

Konsiderante ke la lingvaj rajtoj estas integra parto de la homaj rajtoj, ni prezentos ĉi tie kazojn de malrespekto de lingvaj homaj rajtoj, kiujn oni raportis al ni.

- Malajzio: En 2003, la registaro de Malajzio enkondukis la instruadon de matematiko kaj sciencoj per la angla lingvo, rompante tiel la rajton de la lernantoj uzi sian gepatran lingvon, la malajan, kiu estas la oficiala lingvo de la lando. Antaŭ nelonge, popola manifestacio por la reenkonduko de la malaja lingvo estis repuŝita de la loka polico per tre perfortaj metodoj.

- Turkio : La elsendo de publika televidkanalo, dissendanta el la turka Parlamento la paroladon de kurda parlamentano, S-ro Ahmet Türk, estis tuj ĉesigita, kiam li daŭrigis sian paroladon en la kurda lingvo okaze de la Internacia Tago de la gepatra lingvo starigita de UNESKO.

- Danlando: Perforta danigo de enmigrintaj infanoj. Minaco je forpreno de la infanoj de enmigrintaj familioj, kiuj devus esti, ekde sia plej juna aĝo, en danlingvaj tagaj zorgejoj, se la gepatroj ne parolas dane kun ili hejme. La dana parlamentano de la Socialdemokrata Partio, Mette Frederiksen, proponas enkonduki la devigon de danlingva tagzorgejo por la infanoj de enmigrintoj, ekde ties aĝo de 1 jaro, kaj kaze de rifuzo fare de la gepatroj, la infano estus forprenita de ili.

- Aŭstralio: Lernejoj por indiĝenaj infanoj - en la angla. En la dulingvaj lernejoj por indiĝenaj infanoj de la aŭstralia Norda Teritorio, la Ministrino pri Edukado de la Teritorio, Marion Scrymgour, insistas pri uzo de la angla lingvo en la instruado, tiel kreante malavantaĝajn kondiĉojn por la indiĝenaj lingvo kaj kulturo, igante ties instruadon eventuala, volontula en la posttagmezo.

Ni petas la Konsilantaron pri Homaj Rajtoj enketi e la koncernaj registaroj pri tiuj kvar rompoj de lingvaj homaj rajtoj.

Mi dankas vin pro via atento.

Stefano Keller - Universala Esperanto-Asocio

www.droits-linguistiques.org - www.linguistic-rights.org – www.uea.org – www.esperanto.net